

Flandra Esperantisto

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Verschiĝint maandelijks
Achtthende jaargang
Nummer 12 (210)
DECEMBER 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
L E E N
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.
Van Heurckstraat 7, Antwerpen

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonende leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

IDEALISMO NE ESTAS SENUTILA

Por krei sian projekton de internacia lingvo Zamenhof havis motivojn plejparte idealismajn. Li opiniis la diversecon de la lingvoj unu el la ĉefaj kaŭzoj de malkonsento kaj milito. Li estis la patro de la „interna ideo” kaj kvankam li deklaris, ke ĉiu kiu uzas Esperanton por iu ajn celo havas la rajton nomi sin esperantisto, li por si mem konkludis, ke la tuta projekto fariĝos por li senvalora, se li ne povas propagandi per ĝi siajn homaranismajn idealojn.

La kreinto de nia lingvo oferis ĉiun liberan horon, ĉiun haveblan monon, eĉ tiun de sia bofamilio por la disvastigo de sia idealo. Lian ekzemplon imitis multaj el la unuaj pioniroj. Se ekestis malfacilaĵoj, se iu gazeto ne plu povis aperi, anoncis sin fervoruloj, kiuj kvankam ne riĉaj, oferis sian havaĵon por ebligi daŭrigon. Ke Esperanto enradikiĝis kaj relative rapide kreskis en la unua periodo, ni dankas al la idealismo de la unuaj apostoloj de la ideo de internacia lingvo.

Sed ĉar idealistoj apelacias ĉefe nur al sentoj de idealismo, la vasta mondo, kiu ne facile entuziasmiĝas por idealoj, restis senmova kaj eĉ trovis la Esperantismon sufiĉe ridinda. Tial estas ĝojige, ke inter la esperantistaro aŭdiĝis voĉoj, kiuj akcentis la praktikan valoron de internacia lingvo por komerco, turismo kaj aliaj celoj. La fondo de Universala Esperanto-Asocio estis grava paŝo antaŭen por montri la valoron de Esperanto per praktika aplikado kaj enkondukis periodon, en kiu oni pli kaj pli apelaciis al la racia konsidero ke planlingvo, kiu estas ĝenerale enkondukata, ŝparas tempon, monon kaj energion kaj ebligas kontaktojn kun eksterlando ankaŭ al multaj, kiuj certe neniam havos la okazon ellerni fremdajn lingvojn.

Venis la momento, kiam multaj gvidantoj en nia movado rekomendis ne plu tuŝi la idealisman flankon de Esperanto. La faktoj ja pruvis, ke samlingveco ne forprenas la kaŭzojn de milito kaj ke la promeso de sankta harmonio restas neplenumita. Cetere Esperanton oni opiniis tre taŭga por uzado kaj eĉ bona helpilo por la disvastigo de idealoj, kiuj ne rekte rilatas al la ideo de internacia lingvo.

La sperto tamen pruvas, ke esperantistoj, kiuj lernis la lingvon nur por ĝui kelkajn avantaĝojn, forlasas nin se ili ne plu bezonas tiujn avantaĝojn aŭ se la praktika valoro montriĝas malpli granda ol ili atendis. Cetere tiuj, kiuj aliĝis al nia movado por iel profiti, ne tre inklinas mem fari laboron por la disvastigo de la lingvo. Ili ja venis por ricevi, ne por doni.

El tio ni povas konkludi, ke ankaŭ en la nuna tempo ni urĝe bezonas idealismajn samideanojn, pretajn doni sian tutan personon

ANTVERPENO, URBO DE NIA KONGRESO LA HAVENO



Albertdoko kaj tri havendokoj
(foto: ekonomia havenservo)

Ĉar al Nederlandanoj ne mankas akvo kaj havenoj, mi kun iom da miro sciigis dum la hilversuma kongreso, ke pluraj jam antaŭgis viziton al la antverpena haveno... Sed kial miri, sciante ke la antverpenano mem ĉiam denove satas la kontakton kun la rivero kaj la intensan havenan trafikon! Kaj ĉu la translima fantazio ne estas vekata, kiam oni observas transatlantikajn vaporsipojn kun ofte sugestiaj nomoj, aŭ kontaktas kun ili aŭ io, rilatanta al tiuj markasteloj? Kial ni ne forgesas la patron de l'flandra poeto Marnix Gysen, pri kiu lia filo atestis, ke li sciis pri l'haven', hejmevo kaj ĉagren' ĉe la matenebul', kaj dum vesper' la laŭta rauka kanto de siren'...

La altajn ŝipojn kiujn portas Skeld' li sciis aldirekti firme bele. Ilian nomon amis li, infane kvazaŭ-ludis ja per ĝi: Karatschi, Pantos, Calcutta, samkiel bel-koraloj... Tiu, kiu ie en la mondo diras „Antverpeno”, diras: „mondhaveno, mond-komerco”. Antverpeno ja ne estas res-

por antaŭenpuŝi nian ideon. Sed ĉu ne ekzistas la danĝero ke ili propagandas falsan idealon, ĉar mondpaco per Esperanto ne estas realigebla?

Eĉ se mondpaco ne estas atingebla per Esperanto, certe la interrilatoj kun alinacianoj per Esperanto forprenas antaŭjuĝojn kaj kreas amikajn kontaktojn kaj estas esenca kondiĉo por atingi mondon, pensantan kaj agantan laŭ universalaj principoj. Tio estas idealo, sed samtempe la celo al kiu kondukas la logika rezonado de iu, kiu deziras el pure praktika vidpunkto organizi la mondon laŭ plej efika modelo.

Idealisto estas ne nur tiu, kiu volas doni al la mondo altnivelajn spiritaĵojn, sed ankaŭ tiu, kiu multon ofertas por havigi al tiu sama mondo organizformon, kiu multe kontribuos al la bonfarto, sekureco kaj feliĉo de ĉiuj mondanoj.

Idealistoj kaj realistoj povas ĉi tie renkonti sin por progresigo de la samaj deziraĵoj kaj en tiu renkontiĝo pruviĝos, ke multaj idealistoj estas tre praktikaj realistoj kaj ke al multaj realistoj certe ne mankas la idealismo, kiu laŭ nia opinio estas necesa por doni forton en senlaca batalo por pli bona mondo.

H. J. B.

tadejo de rentuloj kaj pensiitoj, de riĉaj maldiligentuloj, - Antverpeno estas antaŭ ĉio vasta laborejo, kie oni antaŭpreparas la panon por multaj aliaj regionoj...

Tial ĝi, post mondmilito II, grave kontribuis al la restarigo de la ekonomio kaj la transmaraj komercaj interŝanĝoj de okcidenta Eŭropo. En la periodo 1945-1950 pli ol 116 milionoj da tunoj da krudmaterialoj kaj finproduktoj estis transŝarĝataj en Antverpeno, venintaj de aŭ destinitaj por la havena „internlando”: tuta Belĝio, Luksemburgo, norda kaj orienta Francujo, okcidenta kaj sudokcidenta Germanujo, Svislando, Aŭstrujo, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo...

Antverpeno situas je 88 km. de la norda maro sur la dekstra Skeldobordo. Kajomuroj, longaj je 5 km., konstruitaj en profunda akvo, laŭas la rondon, kun kajsurfacoj de 100 ĝis 244 m. da larĝo. Estas la unua havena parto. La duan konsistigas 27 dokoj (410 ha. da akvosurfaco) kiuj estas ligitaj al la riverego pere de 4 markluzoj. La tuta kaja longeco estas 49 km.; la tuta areo havena: 1400 ha.

La haveno disponas plie pri 13 ŝipparaj dokoj. La kajsurfaco de la provizoraj deponejoj mezuras 700.000 kvadratajn metrojn. Pri la ilaro mi nur menciui la 686 arganojn de 1.5 ĝis 50 tunoj, krom la flosantaj de 3.5 ĝis 150 t.; plie funkcias 6 transŝarĝigaj pontoj de 15 t. kaj 21 suĉiloj por transversaj grenojn.

La rivera kaj kanala reto unuflanke, la fervoja reto aliflanke, kiuj ligas Antverpenon kun ĝia „internlando” sumigas je 1570 km. plus 5128 km. Antverpeno estas la plej granda fervoja haveno de la kontinento: 800 km. da duoblaĵo relvojoj en la havena zono.

Kiel lasta pliperfektiĝo okazis en septembro pasinta la inaŭguro de nova petrolhaveno kun doko 650 m. longa, 200 m. larĝa kaj 11.7 m. profunda, kun



Havena ŝarportisto
(foto: ekonomia havenservo)

Wereldnieuws

Het bestuur van de Kopenhaagse scholen heeft mevr. R. Thorsen een beurs ter beschikking gesteld voor een studiereis naar Italië om te zien hoe daar Esperanto wordt onderwezen en voor doeleinden op onderwijsgebied wordt gebruikt.

In Mei werd tot Burgemeester van Wenen benoemd Franz Jonas, oud-redacteur van „La Socialisto” en oud-voorzitter van de Oostenrijkse Bond van Arb.-Esperantisten.

International Friendship League zal voor en tijdens het Internationaal Esperanto Congres bij wijze van proef, in Oslo een vacatiecentrum organiseren, waarbij uitsluitend Esperanto zal worden gesproken. Wanneer deze proef gunstig uit zal vallen, zal I.F.L. zich voor de internationale contacten meer dan tot nu toe van Esperanto bedienen.

In de Bussumsche Courant zal met ingang van Januari 1952 een Esperantocursus voor beginners verschijnen, die zal worden geleid door de heer H. J. Hendriksen, voorzitter van de L.E.E.N. afdeling in Bussum.

In Wörgl (Oostenrijk) zal een Zamenhof-monument worden opgericht, dat zal worden onthuld in de zomer van 1952 ter gelegenheid van de Tirolse Esperanto-dag.

Op 6 October is Kolomano Kalocsay, de bekende auteur van „Streĉita Kordo” en „Eterna Bukedo” en vertaler van „De Hel” van Dante en „De tragedie van de mens” van Madach 60 jaar ge-

worden. Enkele studenten van de Agrarische Faculteit aan de Nihon-Universiteit in Japan, zijn gepromoveerd op in het Esperanto gepubliceerde stellingen.

Het 23-ste congres van De Italiaanse Esperanto-Federatie dat van 9-12 Sept. te Pisa is gehouden, werd door de minister van onderwijs geopend.

Scandinavian Airlines System heeft in verband met het in 1952 te Oslo te houden Esperanto-congres opnieuw een folder in Esperanto uitgegeven.

De door James D. Sayers oorspronkelijk in het Esperanto geschreven roman „Invito al Cielo” is in het Fins vertaald.

De V.A.R.A. zal op 15 Dec. een jeugduitzending verzorgen van 14.10-14.30 u., die gewijd zal zijn aan dr Zamenhof en Esperanto.

Geedziĝos en Hilversum la 8-an de decembro 1951

f-ino SUUS C. VISSER
s-ro P. M. MABESOONE

Hilversum, Galileistraat 42
Amsterdam-O., Pythagorasstr. 122

kilometrolongaj albordigaj kajoj, nova 30 km. longa fervoja reto kaj levponto, kaj ĉirkaŭe la rezervujoj kaj rafinadejoj de du kompanioj... Proksimume 240 ŝipveturaj linioj sekurigas regulajn servojn inter Antverpeno kaj ĉiuj mondaj regionoj...

El turisma vidpunkto la haveno allogas ĉiujare milojn da vizitantoj, kiuj svarmas precipe ĉe Skeldo, kie ĝi - antaŭ la rodo - estas 550 m. larĝa, trairas aŭ traveturas la du subskekdajn tunelojn aŭ partoprenas persipe la veturojn surskekdajn kaj aŭ endokajn aŭ simple admiras la trafikon kaj laboron de sur la altaj promenterasoj. Kaj kiam ili reveturas Antverpenon aŭ turnas la vizagon al la urbo, la bildo de la majesta katedrala turo restas por ĉiam fiksita en ilia memoro. Kaj ili reiras urban tra la kapricaj stratetoj de la tipa „ŝipisto-kvartalo” (ne atentante kelkloke... tro-ornamitajn inojn), stratetoj el kiuj kelkaj konservis sian malnovan karakteron, en la ombro de larĝaj kaj altaj hispanaj pintaj frontonoj.

H. Vermuyten.

NIA LITERATURO

Pluraj personoj, kiuj ne kontraŭas la utilon de internacia lingvo kaj ne neas la ekzistorajton de Esperanto, tamen opinias, ke ne eblas krei belajn en tiu lingvo. Ĉar planlingvo estas lingvo de la intelekto kaj ne de la sento, do ne taŭga kiel literatura lingvo. Komprenoble estas vere, ke Esperanto ne estas unualoke kreita por esti literatura lingvo. Internacia lingvo havas aliajn pli gravajn funkciojn, sed kvankam Esperanto unualoke estas lingvo de la intelekto, ĝi pruviĝas lingvo sufiĉe riĉa kaj elvokiva por esprimi ankaŭ ĉiajn delikatajn nuancojn de la homaj sentoj.

Parolante pri la literaturo de iu nacio, ekzemple pri la angla aŭ franca literaturo, oni per tio vorto celas la beletristikajn produktojn, originale verkitajn en tiu lingvo. Laŭ tiu kriterio la Esperanta literaturo ampleksus nur malmultajn verkojn, ĉar ĝis nun nur malmultaj aŭtoroj verkis altnivelajn originalaĵojn en la Zamenhofa lingvo. La fakto, ke ni posedas nur malmultajn originalaĵojn, samrangajn al nacilingvaj produktoj ŝajne pruvas, ke Esperanto ne taŭgas por literatura verkado, sed la kaŭzo tamen estas alia. Esperanto estas kompare kun aliaj lingvoj nur lingva bebo, eĉ ne 65-jara, kaj pro la fakto, ke la ebloj praktike apliki Esperanton ĝis nun estis limigitaj, la nombro de esperantistoj, posedantaj la lingvon same funde kiel sian gepatran lingvon, estas ankoraŭ malgranda kaj estus ja vera hazardo, se inter tiuj malmultaj esperantistoj, kiuj funde scias la lingvon, troviĝus multaj, kiuj krome disponas pri aŭtoraj talentoj. Verkado ja estas arto ne facila. Tion pruvas la multaj originale en Esperanto verkitaj produktoj kies aperon oni laŭ enhavo kaj stilo povas nur bedaŭri.

Ni esperantistoj, parolante pri la Esperanta literaturo, tamen kutimas doni al tiu vorto pli vastan senceon, ĉar ĝenerale ni per la vorto literaturo celas ne nur la originalajn beletristikajn verkojn, sed ankaŭ la tradukitajn kaj ofte krome verkojn ne beletristikajn, ekz. verkojn pri sciencaj, religiaj aŭ politikaj temoj. Esperanto ja ne estas la lingvo de iu nacio kaj krome ekzistas diferenco inter verkoj tradukitaj en Esperanton kaj verkoj tradukitaj en aliajn lingvojn. La tradukanto, kiu tradukas en Esperanton plej ofte estas samlandano de la aŭtoro kaj do plene posedas la lingvon en kiu la verko originale aperis, tiel ke li pli facile povas reprodukti la pensojn kaj ideojn de la aŭtoro ol iu, kiu ne funde scias la lingvon de la aŭtoro.

La historio pruvis al ni, ke lingvo sen literaturo ne estas vivipova. Bone komprenante tion d-ro Zamenhof kaj aliaj elstaraj aŭtoroj elektis la literaturon kiel ĉefan agadkampon. Per siaj majstraj tradukoj ili multe kontribuis al la evoluo de la lingvo kaj pruvis al siaj kontraŭuloj, ke la Zamenhofa lingvo povas esprimi ĉiujn delikatajn nuancojn de la homa sento. Unu el ili, la fama poeto Julio Baghy, en 1927 proponis ke oni honoru la memoron de d-ro Zamenhof konsiderante la 15-an de decembro, „tago de la libro“. De tiam ĉiu vera esperantisto konsideras morala devo aĉeti verkojn en tiu tago.

La ĉijara „tago de la libro“ alproksimigas kaj ni esperu, ke ankaŭ ĉifoje niaj anoj plenumos sian moralan devon, aĉetante minimume unu verkon de niaj librosservoj. La literaturo ja estas por ni la ĉefa fonto, el kiu ni povas ĉerpi por pliperfektigi nin pri la lingvo kaj akiri internacian stilon, kaj kvankam aperis en Esperanto multaj verkoj, kiuj ne meritas nian atenton, aliflanke aperis trezoroj, laŭ literaturo vidpunkto samrangaj al nacilingvaj beletristikaj. La gvidantoj de niaj librosservoj volonte donos ĉiujn deziratajn informojn!

MI NE HAVAS TEMPON!

„Mi ne havas tempon“ mi ĉiam ekdiras kiam la estrar' mian helpon deziras Por la propagando, por kurso aŭ festo Aŭ se ĝi instigas min nur al ĉesto De membrokunveno pli teda afero De konversacia aŭ lumbildvespero, Preleĝo, kunsido, kongreso, ekskurso, Publika leciono aŭ ia konkurso. Mi ne havas tempon, kaj se mi ĝin havas, Ekzistas afer', kiu pli por mi gravas; Radio, revu', detektiva romano Min pli interesas ol eksterlandano. Se gekonatoj al brig' min invitas, Mi Esperanton volonte evitas, Kaj krome la mondo de ŝajno min tiras: Kinejon tri fojojn semajne mi iras. Mi ne havas tempon; vi tion komprenas Sed tio ja por la estrar' ne konvenas. Ĝi devas labori kaj varbi kaj gvidi, Aranĝi, paroli, raportoj, kunsido, Kaj ĝi organizu, plenigu la kason, Ĝi per propagando atingu l' amason Do ĉia labor' de l' estrar' estas tasko. Kaj mi?.. Nu, mi plendos, se estas fiasko!

H.Veenstra

LA STUDANTO

Uitwerkingen van de opgaven in het vorige nummer:

Sian ferion laŭkutime ili pasigis en la urbo Parizo kaj nur hieraŭ ili revenis (returnis sin). 2. Karese li glitigis la manon sur la hararo de sia filino. 3. Vi kompleksas al mi nur, kiam vi bezonas mian helpon. 4. Kiam mi sidis antaŭ mia skribotablo la paperoj kusantaj antaŭ mi rememorigis al mi mian laboron. 5. Li priskribis ĉielon kun (plenan de) superteraj guoj. 6. Ĉu via frato ankoraŭ ne estas hejme? 7. Se vi volas subteni nian movadon, alĝu al nia asocio!

Mia hundo, kiu nomiĝas Fidelo, naskiĝis kaj grandiĝis en nia domo kaj fariĝis mia plej fidela amiko. Vi do komprenas, kiom mi malfeliĉiĝis, kiam ĝi iun tagon malsaniĝis kaj mi ne plu povis trinkiĝi nek manĝigi ĝin. Mi veniĝis kuraciston kaj petis lin resanigi mian malsaniĝintan hundon. Sed la kuracisto, vidinte ĝin, diris: „la besto jam tro maljuniĝis, ĝi ne plu povos resaniĝi kaj mi do devas mortigi ĝin.“ Kiam mi aŭdis tion, mia koro preskaŭ rompiĝis, ĉar mi ne povis sentiĝi min de mia fidela amiko, sed mi ankaŭ ne povis suferigi ĝin pli longe. Mi ne rigardis, kiam la kuracisto prenis ĝin kaj malproksimigis sin kun ĝi; mi aŭdis, ke pordo fermiĝas kaj mi sciis ke Fidelo kaj mi disiĝis por ĉiam. Ho, Fidelo, kiom malsperigis kaj suferigis min via morto!

Ter vertaling:

1. Gisteren zijn we met z'n drieën naar Amsterdam geweest en hebben daar de dierentuin bezocht. 2. De levensmiddelen zijn tegenwoordig veel duurder dan vroeger. Men betaalt thans bijna het drievoudige. 3. De snelheid der vliegtuigen wordt hoe langer hoe groter. Men bereikt nu reeds snelheden van 1000 K.M. per uur. 4. Hoe laat ben je vanmorgen opgestaan? Om kwart over zeven. 5. De waard beloofde, dat de maaltijd binnen een halfuur gereed zou zijn. 6. De heer A. werd gisteren tot wethouder van onderwijs gekozen. 7. Als wij ons beter vermaakt hadden, zouden wij niet zo vroeg zijn heengegaan. 8. Mijn vriend verbaasde zich erg, toen men hem dat nieuws mededeelde. 9. De kamerdeur werd geopend en de bezoeker trad binnen. 10. Ik waande hem gelukkig, maar hij is zeer ongelukkig. 11. Het was niet juist, dat U hem op dat moment aansprak. 12. Als ge uitgaat, laat de deur open. 13. Toen we op het perron kwamen, zagen we de trein reeds aankomen. 14. Zij logeerden een week bij de heer en mevrouw B., hun beste vrienden. 15. Tien is twee meer dan acht en het tweevoud van vijf.

(A-examen 3-11-'51; Utrecht.)

KIEL TRADUKI „NIET“?

La nederlanda vorto *niet* ne ĉiam havas nean senceon, ekz.: hoe vaak heb

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

ZAMENHOFA MEMORTAGO, LA TAGO DE LA LIBRO ALPROKSIMIGAS! JAM NUN ELEKTU!

	Gld.	Belg. Fr.
Esperanta Krestomatio, dua eldono (ankaŭ por ekzameno A)	1,95	24,-
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann	5,40	72,-
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti	5,40	72,-
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	30,-
La Kapitanfilino, de A. S. Puŝkin	1,20	21,-
La verda koro, de J. Baghy	1,50	25,-
La mistero de l' sango, de Battaglia	2,10	25,-
Negulino kaj aliaj fabeloj, de Grimm	1,25	24,-
Vagabondo kaj Sinjorino, de Kloepffer	3,-	40,-
Pensoj de d-ro Zamenhof	1,10	12,-
Gösta Berling, de S. Lagerlöf	4,80	66,-
Brulanta sekreto, de S. Zwick	2,35	28,-
Princino de Marso, de E. R. Burroughs	1,-	16,-
Kiso de la reĝino, de I. F. Najvin	2,35	28,-
Hamleto, de W. Shakespeare, trad. L. Zamenhof	1,50	20,-
Marta, de E. Orzesko, trad. L. Zamenhof (uzita, sed bonaspekta)	2,-	
Rembrandt, la magiisto, de M. Muller, bind. (kun 100 ilustraĵoj)	5,-	65,-
Porĉosildo kun stelo kaj „Esperanto parolata“	0,75	12,-
Argenta kulero kun stelo kaj bildo de Zamenhof (sen afrankokostoj)	7,50	
La Sankta Biblio, bind.	5,-	60,-
Leteroj de Zamenhof (du volumoj) po	8,55	130,-
Vivo de Zamenhof, de E. Privat	3,50	37,50
Fundamenta Krestomatio, de Zamenhof	5,20	72,-
Pro Iŝtar, de H. A. Luyken	4,50	61,-
Murdo en la Orienta Ekspreso, de A. Christie	1,-	16,-
Beknopt leerboek Esperanto, de G. H. Benink	1,65	22,-
Leerboek Esperanto, de G. H. Benink	2,10	30,-
Post la kurso, de G. P. de Bruin kaj F. Faulhaber	2,-	
Esperanto leerboekje I, de H. A. Appel	1,50	20,-
Tra la labirinto, de F. Faulhaber	5,90	85,-
Leerboek Esperanto, de F. Randi		30,-
Nia Lernolibro, de J. Lem, sepa eldono	2,50	
La Komencanto, de G. P. de Bruin	1,50	
Zakwoordenboekje, de H. W. Alings	0,50	
Schidlof's woordenboek Esp. Ned. en Ned. Esp.	2,75	45,-
Plena Vortaro	11,50	175,-

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
 Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenbergse steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)
 Flandra Esperanto-Instituto donas de 10 Dec. ĝis 10 Jan. jenajn rabatojn: 5 procentoj je aĉetoj ĝis 50 fr.; 10 pr. je aĉetoj de 50 ĝis 150 fr. kaj 15 pr. je aĉetoj super 150 fr.

1. Erare vi metis tiun ciferon en la kolonon de la unuoj. 2. Ĉiu unuopa membro de la unuigo havas la rajton unuigi sin kun aliaj membroj en loka sekcio. 3. Unuanime (unuece) ili batalos unu(j) kun la alia(j) por la unuigo de la homaro. 4. Si unuigis en sia ĉiajn bonajn kvalitojn. 5. Unuvoĉe oni aprobis la decidon organizi unufoje en la jaro unutagan ekskurson. 6. La lastaj estos la unuaj. 7. Ĉiuj domoj estis lumigitaj; nur la unu domo kontraŭ la preĝejo restis malluma. 8. Li faras ĉion unuope. 9. Li la unua rompis la nacian unuecon. 10. La Unuigintaj (Unuigitaj) Statoj de Nord-Ameriko havas proksimume 125.000000 loĝantojn. 11. Kiel unu(a)ĵon de sia brutaro li oferbuĉis ŝafidon. 12. El ŝiaj multaj infanoj unuj estis bonaj kaj aliaj malbonaj.

Prettig Kerstfeest! - Red. en H.B.

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

Dimanĉe:

19.00-19.15 Sofio, 39.11 m: I.

Lunde:

8.15- 8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I
 16.15-16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
 18.35-18.40 Berno, 48,66 m, 31,46 m, 19,60 m: P. de d-ro Arthur Baur.
 23.20-23.40 Hilversum II, 298 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne).

Marde:

2.15- 2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I
 8.45- 9.00 Lille, 235 m, K.I.
 12.55-13.00 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur
 14.45-15.00 Rio de Janeiro, 375 m, 30,71 m: K.
 18.35-18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.
 23.15-23.30 Gvatemalo, 49 m: I.

Merkrede:

18.30-18.50 Romo, 25,40 m, 31,35 m: P
 22.35-22.40 Vieno, 25,46 m, 513 m: I.

Ĵaŭde:

9.30-9.45 Parizo, 445 m: K.
 12.55-13.00 Berno, 16,87 m, 31,04 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.
 14.45-15.00 Rio de Janeiro. Kiel marde.
 18.10-18.25 Vieno, 30 m, 203 m, 25 m, 41 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
 18.35-18.40 Berno, 19,60 m, 31,04 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Vendrede:

18.30-18.50 Romo, 25,40 m, 31,35 m.
 23.15-23.30 Hilversum I, NCRV, 402 m: I. (nur ĉiun unuan vendredon en la monato).

23.30-24.00 Hilversum. Kiel lunde.

Sabate:

21.00-21.15 Sofio, 39,11 m: I.
 23.15-23.20 Hilversum I, KRO, 402 m: I

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.

TELEGRAMSTILAJ KONGRESRAPORTOJ

La 24-a kongreso de S.A.T. kiun partoprenis 600 personoj, okazis 28/7 - 4/8 en Stokholmo. Okazis 3 laborkunsidoj en kiuj oni pritraktis organizaĵajn demandojn kaj raportojn, i.a. de la plenumkomitato, literatura komitato, k.a. Prelegis s-ro Szilagy pri Esperanto en la literaturo kaj s-ro van der Heid pri la rolo de la sindikata movado en la pacbatalo. La kongreso akceptis jenan rezolucion: Pro la militpsikozo kaŭzita de la potenca kaj ĉiufanka reararmado, la kongreso apelacias al la tutmonda organizita laboristaro kunagadi por malebligi novan militon. Nek la diplomatoj, nek aliaj registaraj instancoj, kapablis eviti pli fruajn militojn, kiuj detruis grandskale kulturajn kaj precipe laboristajn instituciojn, ne parolante pri okazigita persona malfeliĉo en multnombraj familioj. La kongreso opinias aktuala, ke senkonsidere al politike diferencaj tendencoj la sindikataj mondorganizaĵoj celu efikan kunlaboron por energie malhelpi la eksplodon de nova mondkatastrofo.

La 23-a kongreso de I.K.U.E., kiun partoprenis 160 personoj, okazis 4/8 - 11/8 en la kadro de la Universala Kongreso en München. Prelegis s-ro L.G.C. de Jong pri elmigrado kaj Esperanto kaj s-ro M. Mielert pri la temo: ĉu mondhistorio havas senceon? Vendredon okazis la ĝenerala kunveno, en kiu oni akceptis novajn statutojn kaj elektis novan estraron. Krome oni diskutis pri diversaj organizaĵaj problemoj.

La 4-a internacia konferenco de K.E.L.I. okazis 28/7 - 3/8 en Markt-leuthen. Partoprenis 100 personoj. La jubilea kunveno de K.E.L.I. okazis 8/8 en München. Pastro Hoppe prelegis pri la vojo al la unueco de la kristanoj kaj K.E.L.I.

heb voor jullie ieder een appel. 8. Die gordijnen zijn ieder wel 10 M. breed. 9. Zij waren met z'n twintigen en liepen twee aan twee. 10. Hij betaalt nooit in gedeelten.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Dec. aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.
Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.
Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

Laŭregulare eksigos el la ĉefestraro s roj P. M. Mabesoone kaj F. Weeke, kiuj ambaŭ estas reelekteblaj. La sekcioj rajtas proponi kandidatojn, sed atentu, ke event. kandidatoj atingu la ĝen. sekr. antaŭ la 15-a de decembro. Krome eksigos f-ino S. Visser, (aŭ ĉu mi skribu: s-ino S. Mabesoone-Visser?) kiu ne estas reelektebla. La sekcioj rajtas proponi kandidatojn antaŭ la 15-a de decembro.

De heer E. A. Burk, die wegens tijdgebrek niet langer de administratie van „De Esperantist“ kan verzorgen, heeft zijn taak overgedragen aan mevr. H. E. te Strake-Leafers, Lindelaan 2a, Driebergen-R. Adressen van nieuwe afdelingsdonateurs, adreswijzigingen en bedankjes geve men dus in het vervolg zo spoedig mogelijk door aan mevr. te Strake, die dan zorgt, dat de afdelingsbeguntings regelmatig „De Esperantist“ ontvangten.

Ni denove atentigas pri la propono de sekcio Amsterdam, ke la sekcioj, kiuj aperigas stencilitan bultenon aŭ kunvokilon, regule interŝanĝu tiujn, por ke daŭre ili restu informitaj pri la laboro kaj vivo en la aliaj sekcioj. Kial tiuj sekcioj ĝis nun ne respondis? Bonvolu relegi la artikolon „Interŝanĝo kaj Kunlaboro“ sur paĝo 3-a en la antaŭa numero kaj reagi al ĝi!

Ĝis nun nur malmultaj sekcioj mendis la novajn kartojn por donacantoj, kiujn je aĉetprezo liveras sekcio Amsterdam. Al la sekretarioj ni sendis specimenan karton. Oni relegu la koncernan cirkuleron kaj menu la bezonatan kvanton, pagante la ŝuldatan monon en poŝtkonton 279871 de s-ino A. Wijnbergh-Pool, Minervalaan 14, Amsterdam-Z.

Devkonscia L.E.E.N.-anaro, Senhezite al posteno! Ŝparu en la nuna jaro Por kongres' en Antverpeno!

REGLEMENTSWIJZIGINGEN

Ni ĉi sube denove publikigas la ŝanĝojn en nia ĝenerala regularo, por ke ĉiuj anoj povu konformigi sian regularon al la novaj cirkonstancoj:

Algemeen Huishoudelijk Reglement: art. 8 schrappen behalve de eerste drie regels; art. 15 „1 Februari“ moet zijn „10 Januari“; art. 19 schrappen behalve de eerste twee regels; art. 23 „een der Februari-nummers“ moet zijn „het Januari-nummer“; „voorzien van“ moet zijn „eventueel voorzien van“; art. 29 het woord „laatste“ vervalt; art. 33 eerste alinea: „15 December“ moet zijn „15 November“; „1 Februari“ moet zijn „10 Februari“; de tweede alinea leze men aldus: „De amendementen worden in het Maart-nummer van het verenigingsorgaan gepubliceerd“; art. 47 leze men aldus: „Het hoofdbestuur bestaat uit 7 leden. De leden van het hoofdbestuur worden gekozen voor de tijd van 3 jaar. Het eerste jaar treden 2 leden af, het daaropvolgende jaar eveneens 2 en het derde jaar 3, volgens door het hoofdbestuur op te maken rooster“, enz.; art. 48 „eerste December-nummer“ moet zijn „November-nummer“; art. 50 „1 Februari“ moet zijn „15 December“, „eerstvolgende Februari-nummer“ moet zijn „Januari-nummer“; art. 59 leze men aldus: „Huisgenoten, jeugdige leden beneden de leeftijd van 21 jaar en werkloze leden betalen aan de algemene kas bijdragen, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting worden vastgesteld“; art. 60 tweede alinea leze men aldus: „De afdelingen betalen zo spoedig mogelijk van de ingekomen gelden van iedere afdelingsbegunstiger aan de algemene kas een bijdrage, die door de algemene vergadering in overeenstemming met de begroting wordt vastgesteld“; art. 68 laatste alinea vervalt; art. 70 „Februari“ moet zijn „Januari“; art. 72 leze men aldus: „De vereniging geeft een orgaan uit, genaamd „Nederlandse Esperantisto“, dat gratis en franco aan alle leden wordt toegezonden“; art. 73 leze men aldus: „De in art. 59 bedoelde huisgenoot-leden ontvangen „Nederlandse Esperantisto“ niet“.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis.
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

GENERALA JARKUNVENO.

la 9.12.1951, je la 14-a h., en hotelo Monico (Noordstation, Brabantstraat, angulo St Lazarusstraat).

TAGORDO

1. Malfermo
2. Financa situacio
3. Raporto de la sekretario
4. Nia Revuo
5. U.E.A.
6. 2-a komuna kongreso en Antwerpen
7. Koresponda kurso (raporto)
8. Elektadoj
9. Diversaĵoj
10. Fermo

Ĝenerala jarkunveno estas la sola okazo por la anoj foje kontakti kun la estraro, kaj, por antaŭmeti diversajn problemojn. La estraro tiam mezuras la agemon de la membroj kaj de la sekcioj. Venu do multope, kaj kunportu fresajn ideojn kaj energion.

Flandra Esperanto Instituto aranĝos malgrandan sed efikan ekspozicion.

ESTRARKUNVENO.

En la sama ejo, sed antaŭtagmeze, je la 10-a okazos la estrara kunsido, kies tagordo estos aparte komunikata al la estraranoj.

AMIKO-VARBADO.

En la maja numero 1947, ni miris ke intertempe jam pasis pli ol 4 jaroj, la Ligo anoncis la unuan amiko-varbadon, kies sukceson vi certe memoras. En la unua artikolo pri tiu iniciato, ni koncize difinis la situacion de la „Amikoj“ en la Ligo, sed poste montriĝis ke multaj varbantoj ne plu klare distingis la celon kaj eĉ pensis ke la varbado havas nur financan signifon. Tial ni mencias en la sekretaria raporto de la ĝenerala jarkunveno, la tiurilatajn decidojn de la estraro. La neĉeestantoj povos ilin poste trovi en la januara numero de F.E.

STOPU LA TRUON EN LA DIGO.

Sub tiu titolo ni instigas en la maja revuo de la nuna jaro varbi duonjarajn membrojn, je 40 FR. Versajne niaj sekcioj jam tro pensis pri la venontaj someraj tagoj kaj la planitaj ekskursoj, tiel ke nur deko da „duonjaruloj“ enviciĝis.

La truo en la digo restis (la multegaj pluvoj de la pasinta somero eble eĉ pligrandigis ĝin). Sur la sojlo de nova jaro, nia kasisito sonorigis la alarm-signalon, jam en la Novembra numero.

Por ebligi grandskalan varbadon, la estraro proponis al la ĝenerala jarkunveno la samajn kotizojn kiel en la antaŭaj jaroj:

Membro 75 FR. (kun F.E.)
Familia membro 25 FR. (sen F.E. sed ricevante „De Esperantist“)
Subtenanta 150 FR. (kun F.E.)
Junul(in)o 50 FR. (malpli ol 21-jara)
Amiko 20 FR. (kun „De Esperantist“)

Kvankam ni ne plialtigis la kotizojn deponitajn 1945, ni certe eltenos tion nur se nia legataro pligrandiĝas. Tial ni nepre petas ĉies kunlaboradon. Stopu la truon! Ĉiu sekcio kaj la reprezentantoj zorgu ke neniu dizertu!

La sekretario.



Voor het jaar 1952 werden de lidgelden op hetzelfde peil gehandhaafd, dit ondanks de gedurig stijgende kosten.

Mogen wij onze leden die hiertoe gelidelijk in staat zijn vragen een steunabonnement te nemen, ten einde de zware last welke het uitgeven

van ons blad (waarop wij terecht fier mogen zijn) medebrenge, enigszins te verlichten?

De verschillende lidgelden bedragen: steunend lid 150 fr. minimum
gewoon lid 75
inwonend lid 25 met „De Esperantist“ onder 21 jaar 50

Belangstellenden kunnen toetreden als vrienden van de V.E.B. tegen een lidgeld van 20 fr. Zij ontvangen „De Esperantist“.

De bijdragen mogen onmiddellijk gestort worden.

Men betale bij voorkeur door bemiddeling van de locale afdeling of de vertegenwoordiger, en zo dit niet mogelijk is, op het postchecknummer, vermeld in de hoofding van het blad.

Nieuwe abonné's ontvangen reeds het December-nummer!

Eerste lijst der steunabonnementen (tot 15-XI-'51) 1952:

S-ro T. v. Gindertaelen, Mechelen.
S-ro C. Meeus, Antwerpen.
Pastor J. de Maeyer, Wijchmaal.

Propaganda-kas.

Totaal vorige bijdragen	1.200
S-ro F. Couwenberg	300
Sekcio Gent	100
Genta ligano	60
Anonimulo	100
	1.760

De penningmeester.

PLAATSELIJK NIEUWS

V.E.B. Afdeling Brugge: Al ges-roj R. Iserentant-Schepens, Blankenbergse steenweg 72, Brugge, naskiĝis 18/11 fileto Dirk. Korajn gratulojn!

V.E.B. Afdeling Brussel. (38 H. de Saegerstraat-Molenbeek St.-Jan): Ziehier het programma voor December: 7/12 Herhaling voor Zamenhoffeest, algemeen onderwerp; 13/12 Raadsels; 15/12 Zamenhoffeest (inlichtingen bij het secretariaat); 20/12 Twistvragen; 27/12 Bestuursvergadering.

V.E.B. Afdeling Mechelen, Leopoldstr. 94): Ons programma van November werd normaal afgewikkeld. Dit voor December is als volgt: 5/12 enigmoj: 12/12 gramatiko; 19/12 lezing; 26/12 gezellig samenzijn.

Alkmaar: Op Vrijdag 26 Oct. organiseerde onze afdeling een propagandavond, met als spreker de alg. voorzitter van L.E.E.N. de heer H. J. Blokker, die in zijn causerie over het onderwerp „Waarom Esperanto?“ vertelde over nut, doel en verspreiding van het Esperanto en tevens wees op de voordelen, die deze in vergelijking met andere talen zo gemakkelijk te leren wereldtaal biedt. Het directe resultaat was een bescheiden ledenwinst.

Zamenhofavond 15/12 in Valk's Lunchroom. Aanvang 20 u. Spreker S. Pragano.

Amsterdam: Sekcio Amsterdam sukcesis organizi komencan kurson, kiun partoprenas 11 kursanoj. Mardon la 13-an de nov. s-ino R. Ch. S. Datoo Toemengoengo parolis pri la pozicio de la Indoneziaj virinoj. Post la paŭzo la prestidigitisto s-ro G. H. Oosterbaan montris diversajn lertajojn. La sekcio invitis reprezentantojn de la aliaj Esperanto-organizoj en Amsterdam por laŭ la sugestoj de N.C.K.E. fondi konstantan lokan kunlaborkomitaton.

Bussum: La sekcio en Bussum aranĝis la 27-an de okt. sian unuan publikan propagand- kaj festvesperon. La multaj ĉeestantoj inter kiuj troviĝis kelkaj ĉefestraranoj kaj membroj de sekcioj Hilversum kaj Amsterdam treege ĝuis la varian kaj allogan pro-

gramon. Precipe la kantoj, kiujn aŭdigis kanthoro sub gvido de s-ro Nieuwenhuijsen tre plaĉis al la publiko.

Den Haag: 6/12 Sankt-Nikolaas festvespero; 13/12 Ne okazos kunveno; 14/12 Zamenhofa vespero, organizota de la loka kunlabor-komitato H.E.K.K.; 20/12 S-ino A. Scholten-ten Cate parolos pri Vincent van Gogh; 27/12 Gramatikaĵoj kaj miksaĵoj.

Deventer: Ĉe la seminario en Deventer la lernantoj fondis Esperantan grupon „La verdaj haringoj“, kiu kunvenas ĉiusemajne kaj kunlaboros en la programo de la Zamenhofa vespero, kiun organizos la lokaj sekcioj de F.L.E.E. kaj L.E.E.N. Junuloj kiuj deziras interkontakti kun „La verdaj haringoj“ skribu al Rijkskweekschool voor Onderwijzers, Singel 20, Deventer.

Groningen: 6/12 Sankta Nikolao venos!; 13/12 Zamenhofa vespero; 20/12 Kristnaska vespero.

Hilversum: 6/12 Sankta Nikolaa vespero; 13/12 Zamenhofa memorvespero; 20/12 Kristnaska meditado.

Rotterdam: En la lasta kunveno de „Merkurio“ f-ino M. H. Vermaas laŭ agrabla maniero kaj kun vervo raportis pri la hispana kongreso en Barcelona kaj skizis siajn travivaĵojn. En la paŭzo oni surtabligis grandan skatolon kun du belaj tortoj. Sur unu la bakisto skribis „18 okt. 1906“ kaj sur la alia „18 okt. 1951“. Merkurio nome ekzistis precize 45 jarojn. S-ro J. Telling gratulis la estraron kaj esperis, ke Merkurio en bona stato festos ankaŭ sian oran jubileon.

(Kvankam iom malfrue, ankaŭ ni kore gratulas! - red.)

Velp: Post propagando de sekcio Arnhem, komenciĝis kurso en Velp.

Dezirans korespondi pri industrio kaj scienco s-ro Hisao Yamamoto, Dzumiĉo, 3 Niŝinomija - ŝi Hyogo, Japanujo, 26-jara teknikisto en kemia fabriko.

BIBLIOGRAFIO

Nia Lernolibro de Jac. Lem; 7-a eldono, eld. F.L.E. Certe ne necesas detale recenzi ĉi tiun verkon, kies unua eldono aperis jam en 1932 kaj kiu estas unu el la plej bonaj lernolibroj por nederlandanoj. Kvankam verkita speciale por F.L.E.-rondoj, ĝi estas bonega studlibro ankaŭ por tiuj neŭtraluloj, kiujn ne ĝenas la „ruĝa fadeno“, kiu trairas la tutan verkon. La aŭtoro kompletigis la 7-an eldonon per (eble tro konciza) ĉapitro pri la adjektivaj adverbiaj komplementoj, kaj la libro do nun pritraktas en 25 lecionoj la kompletan materialon por la A-ekzameno. Por ke la libro fariĝu ne tro ampleksa, s-ro Lem trastrekiis en ĝi la buŝajn ekzercojn, ne malgrandigante tamen per tio ĝian valoron, ĉar la skribaj taskoj, aldonitaj al ĉiuj lecionoj, prezentas al la studentoj abundan ekzerkmaterialon, eĉ tiom, ke estos malfacile fini la 170-paĝan libron, kies teksto estas sufiĉe dense, sed klare presita, en komenca kurso de 20-25 lecionoj. Krome la vortrezoro laŭ nia gusto estas tro granda por komenca kurso (kelkfoje preskaŭ 100 vortoj en unu leciono). Pro tio ankaŭ en daŭrigaj kursoj ĉi tiu lernolibro, kiun ni varme rekomendas, estos bonega helpilo. Prezo gld. 2,50; havebla ĉe la libroservo.

Lingvo kaj Movado de W.F. Kruit (la dua reviziita eldono de „Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto moet weten“) donas sur 16 paĝoj koncizan bildon pri la historio kaj movado, menciante eĉ la plej aktualajn ŝanĝojn. En 12 ĉapitroj la aŭtoro donas tiom da materialo, ke la kandidato, kiu trastudis la verkon, posedas multon pli ol la minimuman scion, postulatan por la ekzameno. Prezo (iom alta) gld. 0,55; havebla ĉe la libroservo.

JUS APERIS:

AKTUALAJ PROBLEMOJ DE LA NUNTEMPA INTERNACIA VIVO

verkita originale en Esperanto de D-RO IVO LAPENNA

Prezo g. 5,- Mendu ĉe la libroservo aŭ f-ino M. H. Vermaas, N. Binnenweg 70, Rotterdam-C; poŝtekkonto 333790.

Dezirindaĵo de ĉiu esperantisto por la librotago aŭ Kristnasko. Legenda de ĉiu internacie pensanta homo.

Jarlibro de U.E.A. 1951, Dua Parto. La dua parto de la jarlibro, same kiel la unua liverata nur al individuaj membroj de U.E.A., enhavas i.a. resumajn raportojn pri la progresoj de Esperanto dum la pasinta jaro kaj liston de lernejoj, kie Esperanto estas instruata. Informoj pri la kotizoj troviĝas sur paĝoj 9-11. Ni jam publikigis ilin en la novembra numero de nia gazeto.

Peer Gynt, drama poemo de H. Ibsen, el la norvega trad. Erling Anker Haugen; eld. Eldona Rondo Trondheim, 258 p. Prezo broŝ. n.kr. 10,50; bind. n.kr. 13,-.

Aktualaj Problemoj de la nuntempa internacia vivo, originale verkita de dro Ivo Lapenna; 140 p. Prezo gld. 5,-.

Manifesto de la Sennaciistoj de E. Lanti; 2-a reviziita eldono; eld. S.A.T. Recenzota.

Recenzo pri la romano „Antaŭ du mil jaroj“ de F.C. Xavier aperos en la venonta numero.

Kopij voor het volgend nummer inzenden vóór 14 December s.v.p.

ANIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post n-roj 115-116: por VEB: f-ino S. Popelier, el Blankenberge; kaj por LEEN: s-ro C. B. Zondervan, el Deventer.

SOLVOJ

N-ro 117. *Horiz.* Komod; koketa; el; postkur; luti; re; Ivo Lapenna; art; tri; da; obe; Edmond Privat; orajlist; fleg; griza; laŭdir.

Vert. Kupl; delong; ad; masiva; mi-aŭi; orlo; dekolt; naiva; id; korupt; petol; erar; koloni; influ; ov; tetra; bateri; alie; ret.

N-ro 118. Neniu sanktulo sen makulo. Ne el ĉiu ligno oni faras violonon. El multaj milonoj fariĝas miliono. Oni ne resonigu kantaĉon jam forgesitan. Kiu trans la muro aŭskultas, tiun la muro insultas.

119. KRUCVORTENIGMO.

Horizontale. 1. bele aranĝi hararon(R); ĝi troviĝas en forĝejo(R). 2. viro bezonas virinon por fariĝi tio(R). 3. apartigi dikajn de pli maldikaj partoj(R); etulo(R). 4. poento en sporta ludo(R). 5. explore distranĉi homan korpon(R); marherbo. 6. malokupi(R). 7. veturi sur dorso de besto(R); diareo(R). 8. abomeninda. 9. malmilde(R); pecetigi. 10. virina. 11. koncerne(R); mallonga vipo(R).

Vertikale. 1. direktanto de muzikistoj(R). 3. malmode uzi alkoholaĵon(R); multvalora malgranda ornamaĵo(R). 4. lasi la lokon al alia(R). 5. meti en likvaĵon(R); kuiri en oleo(R). 6. honora manifestacio(R). 7. rifuĝejo(R); grandare(R). 8. festoĉambrego ĉe universitato(R). 9. parenco(R); strato(R). 11. sveni(R).

120. ANAGRAMOJ.

Trovu kvinliterajn vortojn respondantajn al la donitaj klarigoj. Poste, trovu iliajn anagramojn, kies unuaj literoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

formas proverbon.

1. insektomanĝanta mambesto. 2. ĝi troviĝas sur kverko. 3. pene tiri. 4. estonta viro. 5. antaŭfiksita destino. 6. komerca kalkulo. 7. provoki al batalo. 8. ĝi similas homon. 9. ĝi ebligas elfluadon de fluajo. 10. pulvoro uzata por ŝmiri la haŭton. 11. atingi per jeto. 12. resti sur la piedoj. 13. malnova kordmuzikilo. 14. daŭre esti en sama loko. 15.odoro. 16. religia ceremoniaro. 17. pikilo. 18. planto kun viole ruĝaj floroj en sablaj teroj. 19. vegetaĵo kun panigebaj semoj. 20. arto, kiu pretendas fari mirindaĵojn per supernaturaj rimedoj. 21. trabo sur ŝipo. 22. surrela veturilo.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G.J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 h.s., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel antaŭ la 20-XII-'51.

KONKURSO

POR GRUPVESPEROJ

Du personoj A. kaj B. ambaŭ desegnas kvadraton, laŭ modelo de ŝaktabulo subdividitan en 36 malgrandaj kvadratoj. Alterne A. kaj B. nomas literon, kiun ambaŭ notas en unu el la malgrandaj kvadratoj, ĝis kiam post la 18-a de B. nomita litero ĉiuj 36 kvadratoj estas plenigitaj. A. kaj B. klopodu dismeti la literojn tiamaniere sur la grandaj kvadratoj, ke horizontale kaj vertikale ekestas kiom eble plej multe da vortoj vortradikoj aŭ afiksoj. Neniam ili rajtas trastreki aŭ ŝangi jam skribitan literon. Kompreneble ĉi tiu konkurso taŭgan speciale por progresintoj, povos partopreni pli ol 2 personoj, sed tiuokaze estas pli malfacile akiri multajn poentojn, ĉar la persona influo sur la rezultato ege reduktiĝas. Plenigita kvadrato, ekzemple aldonita, klarigu la sistemon de poentalaĵo.

p a s e r o 6
a m e l o d 6
n i v e l o 6
i k o n o r 6
k o n a t o 6
o b u s o j 6
6 5 4 6 4 6

Horizontale la vorto „pasero“ (6-litera vorto) valoras 6 poentojn. „Amel“ kaj „od“ (resp. 4- kaj 2-literaj vortradikoj) kune valoras 6 poentojn. Same pri la aliaj horizontalaj litergrupoj.

Vertikale la vorto „amiko“ en la 2-a kolono valoras 5 poentojn (la litero b valoras neniom). Al la 3-a kolono oni povas atribui entute nur 4 poentojn por la vortetoj „se“ kaj „nu“. Laŭ la plej profita kalkulado oni povas aljuĝi por la vortetoj „el“ „en“ kaj „as“ (radiko de la vorto „aso“) el la 4-a kolono maksimume 6 poentojn. Estas egale ĉu en la 5-a kolono oni prenas la vorton „rolo“ aŭ „loto“; la maksimumo restas 4 poentoj. La aldonita plenigita kvadrato valoras entute do 67 poentojn (horizontale 36 kaj vertikale 31). Tiu, kiu akiris la plej multajn poentojn, estas la venkinto.

VERDLANDO VOKAS

Do, respondu kaj post aŭskultado sendu dankleterojn al la stacioj!

- Jen kelkaj adresoj:
SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
- Sveriges Radio, Stockholm 7.
- Radio ministerio da Educação e Saúde, Rio de Janeiro.
- La Voz de Centro Amerika Guatemala Cd., C.
- Radio Wien, Argentinierstrasse 30a, Wien IV.
- Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma.

DIVERSAĴOJ

En la Internacia Pedagogia Seminario okazinta 26/7 - 4/8 en Koche am See, kiu okupis sin ĉefe pri la temo: Esperanto ĉe la geinstruistoj kaj en la lernejoj, s-ro P. Korte gvidis kurson por komencantaj geinstruistoj.

La Internaciajn FERIAJN Kursojn en Helsinko partoprenis 21/7 - 28/7 proksimume 120 personoj el 11 landoj. Kursgvidis s-ino Major, f-ino Christensen kaj s-roj Morariu kaj Jörgensen.

Por konkondi Esperanton en la sindikatojn tutmonde, s-ro K. A. Metzkes, Burggravenstr. 52, (22a) München-Gladbach, (Germ.) intencas starigi rondon el seriozaj korespondantoj pri interesanta aŭtantaj informoj kun nepolitikaj

sindikatoj de ĉiuj landoj. Interesatoj skribu al s-ro Metzkes.

Vlaamse Kastelen-kalender. Als waardige voortzetting, na de reeksen „Vlaamse stadhuisen“ en „Vlaamse Abdijen“, waaraan de Vlaamse Toeristenbond en de Vlaamse Automobilistenbond voor 1950 en 1951 hun kalenders wijdten, verschijnt thans een prachtsérie van 13 zeer geslaagde grote foto's, gewijd aan kastelen uit de vijf Vlaamse provincies en Overmaas. De kalender, die keurig verzorgd is, op goed papier en met fraaie bladspiegel, kost slechts 20 fr. en is verkrijgbaar in de V.T.B.-boekhandel te Antwerpen, Brugge, Brussel en Gent, of door storting van 20 + 1 fr op de postrekening nr 936.27 van de V.T.B. St-Jakobsmarkt 45, Antwerpen.

Kiam la kvardeka vivojaro alproksimigas kaj oni krome estas la patro de tri karaj etuloj, iom post iom altrudas sin ia malfido pri la ekzisto de Sankta Nikolao. Kompreneble mi ne parolos kun miaj heredantoj pri la ŝanceliĝanta fido, jam pro tio ke miu koro envas al ili la netuŝitan fidon.

De mia bruma idaro, gardata de la servistino, kiu promesis al ĝi orajn montojn, mi kun mia edzino retiris min, por ĉerpi el ŝia kredo la forton, kiun mi ege bezonis.

La rezultato de mia interparolo estis konsterna. Si iris kun radiantia mieno al sia idaro kaj mi kun plumbopezaj piedoj al la viro, kies laboro konvinku miajn gefilojn pri la fakto, ke ilia kredo apogigas sur fortika bazo. Mi ne volas troigi, sed forlasinte post momento tiun artiston, mi kontraŭscie estus jurinta, ke mi vidas antaŭ mi la bonan Sanktulon. Rigardante min mem, mi sentis min kapabla al grandaj faroj. La mitro elegante ornamis mian hararon kaj la longa blanka barbo eksterordinare flatis min. Tamen el tio vi ne konkludu, ke sen tiuj atributoj mi estas malbela. Sentante min sekura en mia maskovesto, mi kuraje suriris la straton kaj jam baldaŭ mi staris antaŭ la pordo de mia loĝejo. Laŭkutime mi intencis elpoŝigi la ŝlosilon, sed vane mi palpis mian Sanktulon robon kaj sammomente klare konsciigis pri la fakto, ke la konservejo de miaj ŝlosiloj kaŝigas profunde sub ĝi. Rapide mi ĉirkaŭrigardis por vidi, kiom da pasantoj atentis la mizeron de Sankta Nikolao. Feliĉe la nombro ne estis granda kaj rapide mi levis mian veston kaj serĉis en la pantalonpoŝo la ŝlosilon. Sed ĉiuj miaj klopodoj restis vanaĵ kaj rezultigis nur la alproksimigon de kelkaj stratbuboj, kiuj baldaŭ ĉirkaŭis min kaj dank' al sia inteligenteco rapide komprenis la malfacilaĵojn de la forte klopodanta Sanktulo. „Kia Sankta Nikolao; li eĉ ne povas eniri“, unu el ili diris seniluziigita. „Kompreneble ne, li ja elektas la neĝustan vojon. Sankta Nikolao ja iras sur la tegmento. Tuj vi vidos!“ trankvilige respondis lia kamarado. La unua ne estis konvinkita, sed la respondo

SANKTA NIKOLAO SUR LA TEGMENTO

(MEDITADO DE FAMILIA PATRO)

sugestis al mi grandiozan planon. Kial ne agi kiel vera Sankta Nikolao? Enirante ĉe miaj najbaroj mi ja povos iri trans la tegmenton! Ĉar laŭkaraktere mi estas rapiddecida, mi sonorigis ĉe miaj najbaroj kaj informis ilin pri mia Sanktula deziro. Ili kompleze kunlaboris kaj momenton poste mi troviĝis en la tegmenta defluilo, kiu pro kelktaga pluva vetero bedaŭrinde ne estis tute pura. Miaj piedoj enprofundiĝis en mola kaĉo kaj malsekaĵo ĉe miaj maleoloj pruvis, ke por mia transiro mi elektis profundan lokon. Mi honeste konfesu, ke mi ne estas gimnasto kaj aldone al mia vestaro tiu fakto ne faris mian transiron senkondiĉa plezuro. Mi malbenis mian amantan patron koron kaj la persvadan talenton de mia edzino, kiuj decidigis min esti por mia idaro pli ol zorgema patro. Mi sentis min tre feliĉa pro tio, ke mia edzino ne ĉeestis mian majestatan eniron, ĉar mi estas firme konvinkita, ke ŝi ne aprezus ĝin, ĉar ĝi ne okazis senspurre. Vere ne necesas esti Winnetou aŭ Sherlock Holmes por malkovri laŭ kiu vojo mi venis. Singarde mi pluiris, ne farante tro da bruo, ĉar se mia edzino aŭdis ion, ŝi, ne supozante kiel reale Sankta Nikolao agas tiun vesperon, kompreneble alarm-krius, kredante ke rompŝtelisto eniris la domon. Preskaŭ mi atingis la butonon de la elektra lumo, kiam mi apenaŭ ne rompis al mi la kolon pro korbo kun tolaĵoj, kiun la servistino pro kruda malkonfeso de sia kredo pri Sankta Nikolao deponis tien. Elbuŝigante nedecajn vortojn mi fine trovis la butonon. Estus pli bone, se neniam mi estus trovinta ĝin, kaj la samo validas por la mantuko, kiun mi trovis en la korbo kaj kiun mi utiligis por fari la reston de mia ekspedicio laŭeble senspura. Miaj ŝuoj, kiujn mi frotis per la tuko, pli malpli atestis mian deziron purigi ilin. Pri mia longa trenanta robo mi preferis silentu. Ne estas tre edife, vidi sin mem en tia stato; precipe ne, kiam

oni bezonas dignan eksteraĵon. Mi firme intencis kompensi tiujn mankojn per dignoplena sinteno kaj cetere, en esceptaj okazoj infanoj ne estas kritikemaj. Mi fidis je mi mem kaj je tiuj „esceptaj okazoj“ kaj majeste descendis la ŝtuparon aŭ almenaŭ intencis tion fari, ĉar jam ĉe la tria ŝtupo la entrepreno kostus al mi la vivon se ne lastmomente mi ambaŭmane firme estus kroĉinta min al la apogilo. Mi nome ne atentis la fakton ke la peza malseka bordero de mia vesto atingis la ŝtupon pli frue ol mia piedo, pro kio mi kvazaŭ alnajlis min al la ŝtuparo kaj falis antaŭen, ĝuste kiam mi intencis majeste daŭrigi la descendon. Mia fiero preskaŭ rompigiĝis, sed mi pripensis, ke rompigiĝinta fiero estas preferinda al rompigiĝinta spino. Fine mi staris en la koridormalantaŭo. Ĉar mi ja decidis, ke mi agos kiel vera Sankta Nikolao, mi estingis la lumon antaŭ ol fari la decidan paŝon, kiu montrus min ol mia idaro. Oni ofte asertas, ke la homoj posedas multajn latentajn kvalitojn. Povas esti, sed mi absolute malhavas ilin, almenaŭ en mia rolo de Sankta Nikolao. Alivorte, mia apero ne estis sukcesplena aŭ ĝuste tre sukcesplena; tio nur dependas de la fakto, ĉu oni rigardas ĝin de mia flanko aŭ de la flanko de tiuj, kiuj kredas pri Sankta Nikolao. En la tempo, kiun mi bezonis por atingi la pordon de la ĉambro mi sukcesis funde detruji kelkajn senvalorajojn, kiujn mia edzino ege ŝatas. Unu el tiuj senvalorajoj estis antikva vazo el Delft'a porcelano, kiun mi per mia mitro, kiu malebligis al mi ĝuste taksu miajn dimensiojn, forbalais de la breto, sur kiun mia edzino metis ĝin. Mi antaŭsentis la katastrofon kaj lastmomente sukcesis eviti korpan lezon, sed miaj infanoj kompreneble aŭdis, ke Sankta Nikolao alproksimigis. Akcelinte miajn paŝojn mi foletis la bordero de mia robo kaj sciis lastmomente eviti dolorplenan falon, kaptante la tapiŝon de la vesthokaro. Unu, du,

IMAGU!

TINGELINGELING. Mi malfermas la pordon. Ĉarma knabino en vigla uniformo kun granda teko sub la brako.

„Sinjoro, mi venas de la registaro.“

„Bone, fraŭlino.“

„Jes, ni opiniis tie en Hago - vi certe ne plu havos monon post tiuj multekostaj Kristnaskotagoj...“

„Jes, efektive.“

„Tial mi momente venas al vi. Diru nur kiom vi deziras havi... dudek kvin... kvindek... cent guldenojn?“

„Kiom vi celas?“

„Ho, ĝi estas afablaĵo de la ministro pri la financoj. Li tre malpopolariĝis, ĉu vi komprenas? Kaj tial li volis pruvi, ke ankaŭ ĉe li la arko ne ĉiam estas trostreĉita...“

„Kiom bonkorege! Sed supreniru do, fraŭlino.“

„Ne, tio ne eblas. Mi devas ankoraŭ viziti la tutan straton hodiaŭ, ĉar vi komprenas — ĉu estas senmona.“

„Kompreneble.“

„Ĉu mi metu cent guldenojn sube sur la ŝtuparon?“

„Tre volonte, fraŭlino. Kaj bonvolu danki la registaron pro la helpo kaj bonvolu diri...“

„Ho, ne faru penon. Ni mem presas la monon, vi sciu. Kaj por vi tio signifas faciligon, ĉu?“

„Jes, sendube. Nu, mi diru ĝis revido...“

„Ĝis revido, sinjoro. Kaj agrablan jarfinon, en la nomo de la registaro.“

„Koran dankon, fraŭlino. Bonvolu saluti la ĉefministron. Vi bone trovos la elirejon, ĉu?“

Tiam mi vekigis. Ĉar kredo al mi, la registaro certe ne estas tia. Ĝi trankvile lasas nin fuŝadi ĝis la unua de januaro, dum kiam ĝi scias, ke neniu nederlandano havas eĉ nur unu cendon en la poŝo. Kaj se vi hazarde povas diri al mi de kiu mi ankoraŭ povos pruntepreni... ne mi.

Strange, ĉu? Kiam digo rompiĝas aŭ ponto difektiĝas, ĉio iras rapide — sed kiam ok milionoj da nederlandanoj havas la nepre neeban taskon vivi tutan semajnon sen mono, neniu fariĝas varma aŭ malvarma en Hago. Tion ili nomas regi!

Kaj ĉu ni vetu, ke ĉi tiun jaron ni ne ekhavos novjaran mondonacon? Sendube nur patriarkan leteron en la salajrosaketo — ke ni tre bone faris nian eblon kaj ke ni nepre daŭrigu tiel.

Sed tiuj ili povas reteni.

KRONKEL en *ĵurnalo Het Parool*

Trad. J. Rooker

Lille; Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing (N), Fr.

V.A.R.A.; Heuvellaan 33, Hilversum. K.R.O.; Emmstra. 52, Hilversum.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)